# HEJS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

| REDAKTORO: S-RO MIGUEL A. ALTUNA | N.° 96 Sep.-Okt. 1975 | Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.ª Telefono 324 44 92 - BILBAO-5 |
|---|---|---|



La esperanta flago flirtas en la apudstranda promenejo de Gijón.

# ENHAVO

Ni ne ekdormu!..........1
La sensenca ludo.........2
Loterio kaj Notoj........3
Kopenhago:la kongreso..4-5
Malfermita letero......6-7
31ªIJK.Fredericia......8-9
La inteligenta.........10-11
La malsato..............12
Koresponda servo........13
Sciencfikciaj..........14-15
Senpoetika poezio.......16

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de HEJS, escepte en okazo de oficiala komuniko; ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinion de la Redaktoro; do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

# NI NE EKDORMU!

Jes, karaj geamikoj. Tiu hispana diraĵo: "Dormi sur la laŭroj", t.e., mallaboremi post laŭdoj, tre bone klarigas tion kio okazis al nia bulteno dum la nuna jaro. La unuaj numeroj havis apartan valoron, kaj ĝuste tial ili vekis la atenton de gravaj homoj ekster ni.
Sed, jen, vidu tiun ĉi revuon, rigardu, legu ĝin, kaj...komparu. Senrigarde al la kvalito de la unuopaj kunlaboraĵoj, kies verkintojn ni sincere dankas, tiu ĉi ne estas tia "HEJS" kian ni celis kaj iam atingis.
Nu, ni esperu ke, post la somera ripozo, niaj fortoj vekiĝos, kaj la jarfina numero estos ia antaŭvido de la senprecedenca presota 100ªbulteno.
Konstatu, kiel ni ekdormis: ni ne ricevis raporton pri la nacia kongreso; en la pasinta numero tute erare ni diris ke Sant Pau d'Ordal, la urbo kie Hispana Esperanta Muzeo troviĝas, apartenas al Tarragona, dum Barcelona estas vere ĝia provinco; la somnolo trafis eĉ nian presiston, kiu la kovrilpaĝan foton subtitolis per la vorto "inreresiĝuloj", kiuj, fakte, estis "interesiĝuloj".
Tial, ni ne ekdormu!

# LA SENSENCA LUDO

En la vaska lando,kaj,laŭ mia konjekto,en multaj aliaj landoj,ekzistas tipa konkurludo, en kiu du rivalaj teamoj tiras ŝnuron en kontraŭ an direkton,tiel ke tiu pli forta,kiu atingas tiri la ŝnuron ĝis iu difinita distanco,estas la venkinto.

Nu,nenion novan ĝis nun mi diris.Sed,ni haltu kaj pensu.Se ni deflankigas la sportan valoron,ĉu ne stulte ke tiuj fortikaj homoj malŝparas sian energion en senutila celo?Se ambaŭ teamoj tirus en saman direkton,kun la sama entuziasmo, ĉu vi imagas kian grandegan pezaĵon ili povus treni?Estus vere miriga la potenco kiun oni atingus se la saman eforton kiun ili oferas en la konkuro ili kunigus en tiu trenado.

Ĉar pri sporto temas,tio ĉi antaŭe dirita ne havus en ĝi sencon.Sed,ĉu ne vere,ke homoj en ĉiutaga vivo multfoje agas kiel niaj fortuloj?Ĉu ne vere,ke ĉiuj kontraŭstaroj,komercaj,ekonomiaj, politikaj luktoj,militoj,k.t.p.,estas nenio alia ol sensenca tirado en du kontraŭajn direktojn? Por kio tiu konkuro inter potencaj landoj,inter la malfortaj,inter nafto- kaj teknik-havantoj, inter simplaj homaj estaĵoj?Ĉu ne pli bone se ni ĉiuj kune trenus la homaron al pli alta,justa kaj egaleca ŝtupo?

Ne tie finiĝas la meditado,ĉar oni povas ĝin apliki al nia esperanta movado.De ni ĉiuj estas sentata nia malgrandnombreco.Kompare al la tuta homara amaso ni estas kvazaŭ atoma partiklo.Tio devus nepre kunigi nin en la antaŭenigo de nia idealo.Tamen,ĉu tio vere okazas?Ja ni scias ke tute ne.Ĉu mond-,ĉu naci-,ĉu urb-skale,ĉie ekzistas malamoj,disiĝoj,atakoj.Ĉu vi pensas ke tiel ni povos venki?

Nur tiel,se ĉiuj sian aktivadon kaj efikon koncentros en saman unudirektan trenadon,ni povos loki esperanton tie,en la komuna universala uzado,por kio ĝi estis kreita.

ASIER

# LOTERIO



Denove,kiel ĉiujare,HEJS havas loterion je via dispono.Per ĝia vendado ni esperas ke niaj financoj pliboniĝos.

Ni havas kvitancojn kies kosto estas 50 ptoj. aŭ 25 ptoj,krom plia 20% (t.e. 60 ptoj kaj 30ptoj. respektive).

Limdato por la mendo estas la 10ª de decembro. Ne plu estos akceptitaj mendoj post tiu dato.Ĉiujn mendojn,per poŝtmandata pago,faru al tiu ĉi adreso:

S-ro. José Miguel Fdez-Zurbitu
Gregorio de la Revilla 21
BILBAO-11

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

HISPANE-HISPANE-HISPANE-HISPANE-HISPANE-HISPANE-

Como todos los anos,tenemos participaciones de lotería de 50Pts y 10Pts,que con el donativo a HEJS hacen 60 y 30Pts respectivamente.Haced los pedidos por giro postal a la dirección arriba indicada.

# NOTOJ:

-La 19ª Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo okazos en Cuxhaven-Berensch de27.12.75 ĝis 3.1.76.Por informoj kaj aliĝoj skribu al Guido Brandenburg,4401 Westbevern,Brinker Damm 24 (FR-Germanujo)

-La 11ª jarfesto de Itala Esperanto-Junularo okazos komence de januaro en Vercelli(Torino).Informoj ĉe Brunetto Casini,1-56010 Ghezzano(Pisa), via P. Colleta 2 (Italujo)

-Esperanta semajnfino okazos en Londono la 12-an 13-an kaj 14-an de decembro.Informoj ĉe Brita Esperanto-Asocio,140 Holland Park Avenue,London W11 4UF (Britujo)

-En Gijón ne nur flirtas la esperanta flago,sed ankaŭ oni instruas E-on ĉe Ateneo Jovellanos.

# KOPENHAGO:

# LA KONGRESO DE LA OPTIMISMO

La dana ĉefurbo,Kopenhago,por la 3ª fojo gastigis la plej gravan jaran kunvenon de la Esperanto-Movado.Kompare al la kutimaj ciferoj de partopreno,tiu ĉi kongreso,kun 1200 aliĝintoj, estus unu el la malpli gravaj,sed aliaj kialoj povas igi ĝin unu el la plej esperigaj por la estonteco de nia idealo.

Unua bona signo estis la mesaĝo per kiu la Generala Direktoro de UNESKO esprimis sian plaĉon pro tio,ke en la de U.N. deklarita Jaro de la Virino,la esperantistoj elektis kiel kongresan temon la rolon de la virino en la socio.Estas rimarkinde,por konstati la gravecon kiun riliate la prestiĝon de UEA havas tiu ĉi mesaĝo,ke la Generala Direktoro de UNESKO adresis sin por la 1ª fojo al Universala Kongreso.

Cetere,kiel en ĉiuj jaroj,registaraj reprezentantoj salutis la Kongreson nome de siaj ŝtatoj,en nombro de 19.Bona ideo estis la disdivido de la komenca programero en 2 partojn:Inaŭguron,kun salutoj de ekstermovadaj reprezentantoj,kaj Malfermon,por la Landaj Asocioj kaj Prezidanto de UEA.

Iom pli mi priparolu la programon.En la Unua Generala Kunsido de UEA,dediĉita al la estrara raporto,oni ĉefe pritraktis la financan situacion de la Asocio,kiu,danke al ŝparoj saĝe enkondukitaj estas nun pozitiva.Dum la Dua Generala Kunsido oni pristudis la kongresan temon per raportoj de diverslandaj virinoj pri la pozicio de virino en la respektivaj landoj.Du teatraj vesperoj entute estis;la unua havis specialan dupartan programon,kiu konsistis,respektive,en majstra pupludado kaj unupersona teatraĵo, "Maria Curie".La dua teatra vespero estis laŭ tradicia stilo,kun unusola teatraĵo,ankaŭ tradi-

cia,aŭ,pli bone,klasika verko,"La servisto de du mastroj";ludis ĝin,kun perfektaj prononco kaj interpretado,Bulgara Esperanto-Teatro.Bone estus pensi,por venontaj jaroj,pri rolado de moderna verko por modernaj homoj.

La Internacia Vespero havis la ĉiaman programon.La Dana Vespero,kiu okazis post malavara akcepto de la du kopenhagaj urbodomoj,al kiu ĉiu kongresano povis ĉeesti,prezentis al ni ĉefajn ecojn de la gastiganta lando.El ĝi,plej ekzotikaj kaj amuzaj estis la gronlandaj dancoj kaj kantoj;se ne estus tiel longa la distanco kiu nin disigas,mi dirus ke tiu muziko estas vaska. Ĉu ekzistas ia parenceco inter ambaŭ popoloj?

La junulara tago,bedaŭrinde kiel tradicie,lamis pri intereso kaj organizo.Matene,en publika Tejo-kunsido,la sekretario raportis pri la pasintjara agado,kaj sekvis demandoj de la aŭskultantoj,ĉefe rilate la aktivadon de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj.Tagmeze,en komuna lunĉo,kunvenis ĉiuj gejunuloj.Vespere,la balo ne estis tio propre dirite,ĉar tiel ejo kiel muziko ne estis allogaj tiucele.Multe pli atentoveka estis la samtempe okazanta Dana Vespero.

La Fermo metis finan punkton en tiu jubilea kongreso.La 61ª Universala Kongreso okazos en Ateno.La situacio kaj allogeco de tiu ĉi urbo antaŭvidigas sufiĉe multnombran ĉeeston.

Laŭlonge de la kongresa semajno disvolviĝis sesio de Internacia Somera Universitato.Laŭga aldono al la ĝistiama stilo estis la enŝovigo de seminarioj,en kiuj,post la prelegoj,kunvenis spertuloj;tiaj seminarioj estis la kaŭzo ke tiel, por multaj kongresanoj,la kongreso iĝis,krom turisma,studa afero.

Mi finas per aludo al la kunsidoj de la Komitato,kiu,post la hamburga krizo,harmonie laboris; oni ja vidas,ĉefe per la financaj rezultoj,ke la situacio de UEA draste pliboniĝis,kaj la nepra neŭtraleco de la Asocio estis asertita de rezolucio de la Komitato.

Tial,kun optimismo ni alfrontu la estontecon!

(Red.)

# MALFERMITA LETERO AL LA ESTAĴOJ EL ALIAJ GALAKSIOJ



ESTIMATAJ AMIKOJ!!

Eble jam mia unua esprimo - estimataj amikoj - estos strangaĵo por vi, ĉar prave vi pensos, ĉu ĉiuj tero-loĝantoj ne estas amikoj niaj? Havu paciencon, ĉar ĉio klariĝos.

Mi skribas al vi ĉi tiun leteron petante al vi la jenon: Kiam vi vizitos nin, kiam vi venos al nia planedo, la Tero, vi ne tuj forflugu, restu iom da tempo inter ni. Jam estas multaj teranoj, kiuj asertis ke ili vidis vin. Persone mi ankoraŭ ne havis tian senmezuran plezuron.

Iuj personoj el tiuj kiuj vidis vin diras, ke vi venas al nia "paradizo" pere de grandaj kaj brilantaj kaseroloj, teleroj aŭ patoj; mi persone nenion povas aserti, ĉar mi neniam vidis vin nek viajn veturilojn.

Mia peto estas, restu kun ni, kunvivu kun ni, se ne por ĉiam almenaŭ dum kelkaj monatoj. Vi ja multe povus lerni pri nia raso, ĉu nia raso estas bona aŭ malbona?, tion mi ne scias. Se kiam vi alteriĝas en iu loko de nia planedo pensas, ke ĉiu homo de la Tero estas simila al la tieaj loĝantoj, vi plene eraras. En nia planedo estas multaj kaj diversaj rasoj eĉ kun haŭtkoloro malsimila. Eble vi ankaŭ pensas, ke la vivo ĉi tie estas egala por ĉiu homo. Kia granda eraro!! Ĉi tie en nia planedo - Tero - estas homoj kiuj multe manĝas; male, estas aliaj, kiuj mortmalsatas. Estas iuj, kiuj regas la regantoj kaj aliaj, kiuj nur devas obei; estas iuj, kiuj produktas ĉion necesan por nia socio, dum aliaj produktas nenion, sed paradokse estas la nenion-farantoj, kiuj pli bone vivas. Nu, mi ne scias ĉu vi kapablos kompreni nian sociordon.

Ĉu frateco?,jes,ni jam vivas tiamaniere,sed de tempo al tempo ni eksplodigas terurajn militojn kaj sovaĝe nin mortigas reciproke.Estaĵo el aliaj galaksioj,ne klopodu kompreni nian vivoformon tre rapide;tio estas ege malfacila ĉar inter komprenо inter ni ankoraŭ ne ekzistas.

Se iam iu el vi estus tiel afabla min viziti, mi rakontus al li multon pri ni,pri nia vivo kaj kutimoj,por ekzemplo:ni havas fluaĵon,kiu venas el la interno de la tero,ni ĝin nomas nafto,benzino.Nu,kara amiko,verŝajne kaj laŭ opinio de la spertuloj,tiu benzino,kiun ni uzas por niaj transportiloj estas elĉerpebla kaj kiam tio okazos la vivo en nia planedo - Tero - "paraliziĝos",kio signifos la finon de nia ekzisto.Tamen,kaj vi konstatu nian saĝecon,tiun juvelon,la benzinon, nuntempe ni dediĉas tre ofte por banalaĵoj.Ĉu vi povas ion kompreni? Mi pensas ke ne.

Mi ĉiam pensas,ke vi estas tre honestaj homoj kaj neniel vi intencas konkeri nian planedon,sed, se jes,mi konsilas al vi ne uzi armilojn.Se en via galaksio ekzistas metalo konata,ĉi tie en la Tero sub la nomo -ORO- kunportu ĝin al nia planedo.Por la posedo de tiu metalo ni baldaŭ mortigus nin plenkore,kaj sen la perforto vi fariĝos la mastroj de la Tero.Ĉu surprizo? Tio ja estas vero,amikoj miaj.

Ĉi tie en la planedo -Tero- kiam oni desegnas vin,via figuro estas tre simila al tiu nia,sed mi ne scias pro kia kaŭzo la desegnistoj ĉiam metas sur viajn kapojn ion similan al tio konata inter ni per la nomo -kornoj-.Mi petas,karaj vizitantoj el aliaj galaksioj,vi ne faru la samon, do,se vi post legado de ĉi tiu letero afablas aperigi mian figuron,neniel vi metu sur mian kapon tiajn kornojn aŭ similaĵojn;ĉi tie en la Tero ĝi estas afero tre serioza kaj ofte la feliĉo dependas de la bona uzado de tiu ornamaĵo.

Miaj karaj amikoj el aliaj galaksioj,mi finas la unuan leteron;mi pensas ke por la unua fojo, ĝi jam estas sufiĉe ampleksa.Ne hezitu kaj demandu al mi pri kio ajn;mi ĉiam klopodos vin informi.Salutojn.

Luis Serrano Pérez (Sabadell)

# 31ª IJK FREDERICIA

Kiel bone atestas la titolo de ĉi skiza raporto, Fredericia estis la urbo kiu ĉijare gastigis nian karan TEJO-eventon : La IJK (internacia junulara kongreso ).

La kongreso,al kiu aliĝis 269 junuloj el la tuta esperantujo , okazis sub la aŭspicioj de la dana kulturministro Niels Matthiasen kaj estis semita da diversaj programeroj, ĉiuj sufiĉe interesaj por altiri la atenton de la tuta partoprenantaro, kvankam tiu aserto estas nur teoria.

Ni diru ke la ĉeftemo estis "kultura interŝanĝo" kaj en diversaj laborgrupoj oni pritraktis ĝin laŭfake; tiel ekzemple Spomenka Štimec, tre simpatia kaj aktivema jugoslavino , gvidis la grupon kies temo estis " kultura interŝanĝo inter evoluintaj landoj kaj landoj en evoluo". Eric Nemes, unu el la nunaj redaktoroj de kontakto,laboris kiel gvidanto de la grupo kiu sisteme traktis pri la "interŝanĝo por difini integrantan modelon de la nuntempaj kulturoj". Bruĉjo Kasini, denove reelektita ĝenerala sekretario, kunfandis la ideojn de la ĉeestantoj al sia laborgrupo kiu pristudis la terenon por"Socia organizado kaj kulturinterŝanĝo".La japanaj samideanoj sub la gvido de Katoogi Mizue,prizorgis "por pli efika interŝanĝo Japanujo-- ne tiel, sed tiel ĉi ! " kaj laŭ la vidpunkto de kvanto da partoprenantoj , tiu estis unu el la plej sukcesaj laborgrupoj kune kun la gvidata de Goar Engeländer kaj Ite Tytgat , kiuj klopodis kaj fakte sukcesis unuigi la voĉojn de la kongresaj kantemuloj en la grupo"Kantoj". "Skandinavaj popoldancoj"estis la grupo kiun vartis Gunnar Farm kaj Christian Lauridsen.

La hispana samideano(HEJS-estrarano)Johano Guiñon, esploris kun siaj laborgrupanoj la neagrablan temon "VIVO PRO VIVO - MORTOPUNO".Ulrich Brandenburg kiel respondeculo (ĝis ĉi kongreso) pri la fako "edukado de gvidantoj" devis prizorgi etan seminarion pri ĉi temo, dum la simpatia belgino Gert Van Tongerloo faris sian eblon kun la komencantoj,por kiuj ŝi elektis la temon "Belgujo kaj ĝia trilingveco.

Ankaŭ , kiel en la antaŭa jaro , okazis samtempe la KER-seminario;malfeliĉe oni anoncis ke la ĝisnuna prizorgantino de tiu grava fako de TEJO, Rada Gavrilović,ne plu povas daŭri en la posteno kaj konsekvence oni devas serĉi iun konvenan anstataŭanton; la temo de la seminario estis "Lingvo kaj malkoloniiĝo".

Prelegoj de la prezidanto de UEA, Humphrey Tonkin pri "La fenomeno de la Esperanto-literaturo", Konisi Gaku pri"Japana literaturo kaj filozofio",kaj Madeleine Haudebine pri "Hindujo", aldonis intereson pli kvante.

La TEJO-komitato (kompreneble)kunvenis sufiĉe ofte, cele al la solvo de la organizaj problemoj kaj la elekto de la nova estraro, kies ĉijara konsisto ŝajnas pli tutmondeca ol tiu de antaŭaj jaroj, kaj por kies vicoj estis reelektita nia hispana samideano Juan Azcuénaga.

Aparte interesa antaŭprezentiĝis la diskuto pri la nova statuto (?) de la organizo (?), sub la gvidado de la tiama prezidantino Flora Szabó-Felső , sed tiu ne okazis pro ankoraŭa nematuriĝo de la afero kaj pro la fakto ke TEJO dependas de UEA,kaj tiu asocio ankoraŭ ne havas preta sian propran statuton,al kiu TEJO devos iel konformiĝi en kelkaj punktoj.

Distraĵoj konsistis el: la kutima balo, promeno tra la urbo, la prezentado de kantoj kaj dancoj far la laborgrupoj, la vespera festo kun popoldancantoj de Fredericia kaj gimnastika ensemblo,la "Vespero de malmulte konataj -kulturoj",eble la plej forta plado inter la tuta "distra manĝaĵo", kaj la vizito al danaj familioj , tre interesa ~~eksperienco~~,kiu montris al la partoprenantoj kutimojn kaj vivmanierojn de la dana hejma medio.

Fine,oni devas danki la LKK-anojn pro ilia laboro , kiun ili plenumis malgraŭ tiom da malfacilaĵoj,kaj deziri sukcesplenan laboron al la nova prezidantino ( 1975 estas jaro de la virino ) Claude Nourmont.

Noto: anstataŭ statuto kaj organizo, al neniu ĝenos legi REGULARO kaj SEKCIO, ĉu? .

MIGUEL GUTIERREZ ADURIZ

**ATENTU!!** La limdaton de la konkurso de hispanlingvaj sloganoj pri esperanto ni prokrastis ĝis la fino de la jaro.Ne forgesu:unua premio estas 1000 ptoj!

# LA INTELIGENTA MALSAĜULO

Tie li promenante iras laŭ tiu vojeto;li iras pensante ke ion li esperas,kaj li volas kredi ke je la fino de la vojo la lumo eliros por ricevi lin.

Jes,li pensas pri miloj da grandaj aĵoj,li pensas ke li estas pli ol ĉiuj;li pensas ke li estas malsama,ke io estas,kaj tamen li daŭrigas ebria pro iluzio.

"Malsaĝulo!"-li pensas- sed liaj piedoj antaŭeniras,forgesante kion lia menso diras.

Li ne kalkulas kiel facile estus retroiri,li ne kalkulas kiel facile estus forgesi,li ne kalkulas ke estus eble komenci,ke li devas komenci se li deziras vivi,komenci aŭ morti,li pensas,eĉ li tion diras laŭte,sed li ne haltas,li antaŭeniras kaj kiam li vidas ion similan al Ĝi lia koro eksaltas,li krias kaj diras:Malsaĝulo!,kaj li daŭrigas,daŭrigas antaŭen,tie oni vidas lin,kun alta rigardo li ekkantas por forviŝi de sia menso la deziron komenci.

Kaj tiam li sin sentas en la gloro,kaj tiam li sin sentas mastro de la mondo,li sentas Ĝin apud si.Subite,zas!,ŝtono atendas lin en la vojeto,lia revo malaperas kaj ĝi estas anstataŭita de flako sur la koto;li falas.

"Malsaĝulo!"-li ree pensas- kaj,kompreneble pro la kotgusto en sia lango li jam ne trovas bela la aventuron kaj li ĝin forlasas.

Li rigardas la ĉielon,kiu jam eksteliĝas,li rigardas la lunon,kiu jam ekvidiĝas,kaj li pozas inspiritan mienon,kompreneble fiktivan,kiu ne kontentigas lin.

Li aŭdas malantaŭ si paŝojn,li ĉirkaŭiras sa-

tega pro ĝojo;ĝi estas kato.

Li prenas cigaredon kaj ekbruligas ĝin,ŝveliĝas sian vizaĝon kaj en sia grimaco li ree ĝin memoras,li suspiras,li jam alvenas en la brua loko.

Unu kaj alia ĝin memoriĝas,multaj krioj,brilnataj okuloj kiuj rigardas,tie Ĝi estas,li kuras post Ĝi,Ĝi foriras;"Ĝi ne estis"-li pensas-;alia nedaŭra vizio.

La cigaredo finiĝis kaj li premas ĝin en siaj fingroj;li rompas la cigaredingon,eniras preĝejon kaj sidiĝas.Li fermetas la okulojn.Nun jes, oni vidas lin izola,li pensas:"Malsaĝulo!" Kelkmomente li ĉion forgesas,li vidas belajn bildojn, dolĉajn mienojn ridetantajn,manoj kiuj donas...

Flaĉas al li tiu duonlumo,kaj tie li sin sentas sekura.

Iu ekbruligas la lumon,kaj ludas orgenon;li ŝatas ĝian muzikon;la popolo tedas lin,kaj li foriras;li spiras profunde kaj pensas:Malsaĝulo!

Denove li perdiĝas inter la popolo.

Nun li vidas Ĝin,li iras al Ĝi,li rimarkas ke jam estas nokte,kaj...zas!,stumblo,komenciĝas la trotuaro.Denove li perdiĝas inter la popolo,kaj tiel tagon post tago li ripetas la heroaĵon kaj kiam li finas li diras:"Eble morgaŭ mi sukcesos."

Ĝis kiam...komprenèble la hazardo ekzistas, kaj iun tagon ili sin renkontas en stratangulo, kaj nun li ne trovas ion por diri,li klinas la kapon,li sin sentas malgranda;jes,li havis preparita la scenon;en lia imago ĝi estis bela,sed reale...

"Malsaĝulo!"-denove li foriras kaj kiam kvin minutoj pasas,li reiras al la stratangulo.Se Ĝi estus tie ankoraŭ...

Ne,la hazardo ne estas ofta;kaj li foriras, kaj li revenas kaj atendas."Malsaĝulo!"

JoGo

# LA MALSATO

## DEFIO AL HOMARO

Nun, kiam la homo iras tra la kosmo, sendas kosmoŝipojn al Marso kaj Venuso, kaj eĉ promenas sur la Luno, ĉi tie, en nia propra hejmo, la tero, du el tri homoj estas malsataj.

La malsata estas "la plej grava homa problemo de ĉi jarcento", diris la eksa direktoro ĝenerala de la FAO Binaj R. Sen. Tamen, mi opinias ke ne nur ĝi estas problemo de ĉi jarcento, sed de ĉiam. Estas vortoj de Budho: "la malsato kaj la amo estas la ĝermo de la tuta homa historio". Li pravis.

Nuntempe, la plej grava afero estas ke ĉiujare estas pli da malsato en la mondo, ĉar oni nenion faras por ĝin bremsigi, sed tute male. Hodiaŭ, por subteni la prezojn, la nacioj kiuj havas ekscеson de nutraĵoj jam ne faras la kruelaĵojn uzi la kafon kiel hejtaĵo en lokomotivoj, ĵeti la fiŝojn denove en la maron, aŭ adulteri la tritikon per metileno. Ne, tute ne, ili jam ne faras tion, ili NUR reduktas la produktadon en mondo kie el tri homoj du estas malsataj!!!

La riĉa loĝantaro de la mondo, 29% de la loĝantaro el nia planedo, uzas, kaj, plej grave, malŝparas pli ol kvar kvinonojnde la mondaj riĉo-fontoj. Usono konsumas aŭ malŝparas ĉiujare 42% de la tutmonda konsumo de aluminio, 23% de kupro kaj petrolo, 28% de fero, 26% de zinko, la duononde natura gaso, ktp.

Eble iu demandos pri la tiel nomataj kampanjoj kontraŭ la malsato, sed, bedaŭrinde, la respondo estas, krude, ke ili nur taŭgas por trankviligi la konsciencon de multaj personoj. Tiaj kampanjoj, diras Enrique Baron, nur montras ke la problemo de la malsato estas subkondiĉita de la ekonomia sistemo kiun oni subtenas kaj de la tipoj de produktado kaj konsumo, kiujn ebligas tiu sistemo. Pretendi tiamaniere la eksterminadon de la malsato estas kvazaŭ voli sanigi kanceron per aspirinoj.



# KORESPONDA...

- Siekierska Grażyna,str. 22 Listopada 7/1 PL-19.500 Gołdap (Pollando).18-jara;intereso pri libroj,bildkartoj,filmoj.

- Jodzis Alicja,str, Obr. Stalingr. 17 PL-19.500 Gołdap (Pollando).18-jara;intereso pri libroj,fotografio,sporto.

- Marek Wesołowski,str. Suwalska 6/a/2 15.900 Białystok (Pollando).17-jara;intereso pri sporto,E-revuoj,vojaĝoj,poŝtmarkoj,fotog.,radiotekniko.

- Wilozko Jadwiga,str. A. Mickiewicza 72/1 15.900 Białystok (Pollando).19-jara;intereso pri libroj,poŝtkartoj,fotografio,floroj.

- Wójnikiewicz Tadeusz,str. Pionierska 5/9 19.500 Gołdap (Pollando).14-jara fervora esperantisto.

- Kotkowska Grażyna,Zespół Szkół Artyst,str.Podleśna,15.900 Białystok.20-jara studentino de pentrarto kaj muziko.Tre aktiva esperantistino.

- Klimiuk Lila,str. Krzywa 16/1 15.217 Białystok (Pollando).17-jara;intereso pri privojaĝaj libroj,fremdlingvoj,mondpaco,UNESKO.

- Awdelič Vlasta,str. Pere Biškupa 18 43.000 Bjelovalo (Jugoslavio).15-jara;intereso pri bildkartoj,poŝtmarkoj,insignoj,libroj kaj moderna muziko.

- Klára Mészáros,str. Maros u 34 F.4 1122 Budapest (Hungarujo).21-jara;intereso pri korespondado kun hispanoj.

- Ch. Hochhauser Armony,Professeur de Langues, P.O. Box 5171,Haifa (Israelo).Intereso pri korespondado kun ĉiuaĝaj inoj,pri ĉiuj temoj.

# ...SERVO




SCIENCFIKCIAJ
bildrakontoj
1
tradukis: tao
La okulo de la Morto!
BASIL WOLVERTON
KIO OKAZIS AL HOYT GILPIN KAJ LON ULLRIĈ, LA DU HOMOJ KIUJ ANTAŬ DU MONATOJ EKFLUGIS AL VENUSO EN SIA EKSPERIMENTA KOSMOŜIPO, RESTIS MISTERO ĈAR EN TIU TEMPO NENIU KLOPODIS VOJAĜI EKSTER LA LUNA LIMO.
MIAJ PENSOJ VAGADIS AL LA EBLA SORTO DE LA TERANOJ DUM MI SIDIS SOLE EN LA METEOSTACIO RIGARDANTE LA HALLUMAN ĈIELON. SUBITE, MI RIMARKIS KARAKTERIZAN LUMBRILON ELSTARIĜANTE SUPER LA STELOJ.
ŜAJNAS ESTI LA KOSMOŜIPO! KAJ ĜI ALPROKSIMIĜAS!



HO... JES, UNU KOSMOŜIPO! LA KOSMOŜIPO DE GILPIN KAJ ULLRIĈ! KAJ ĜI SURTERIĜOS ĈI TIE!
MI ELKURIS EN LA MALVARMAN AERON DE LA NOKTO RENKONTE AL LA VETURILO..
KAJ KIAM MI ALVENIS APUD ĜI, LA FUMO JAM FORESTIS KAJ LA FERDEKPORDO HALFERMIĜIS MALRAPIDE.
EL LA KOSMOŜIPO ELIRIS FIGURO KUN PERTURBITA MIENO KIU RIGARDIS MIN STRANGE. SAME STRANGA ESTIS LIA UNUA FRAZO!
LA BONVENIGA PERSONA KOMITATO, KIA MALFELIĈO POR VI!
VI ESTAS HOYTH GILPIN! ĈU EBLE VIA KUNVOJAĜANTO..?
ULLRIĈ RESTIS EN VENUSO! MI REVENIS SOLA!
DO VI ATINGIS VENUSON! BONE! APOGU VIN SUR MI, NI SOPRENIROS EN LA METEOSTACION!
GILPIN, TUJ POST ENIRO, LASIS SIN FALI SUR BRAKSEĜON. NERVOZE LI LUDETIS PER SIA VOJAĜSAKO.
LA TUTA MONDO ATENDAS VIAJN NOVAĴOJN! ĈU VI VOLAS KOMUNIKIĜI KUN NOVAĴAGENTEJO?
NE, NE! MI TELEFONOS NENIUN!
?
LA MONDO SCIOS KE MI REVENIS! JES, TRO BALDAŬ! MI DIROS AL VI KIAL!

## Ŝenpoetika poezio

# AŬTUNE


Petro Nuez
hajkoj

Folioj ruĝas;
sur kabloj hirundaroj:
migrado urĝas.






Estonta vino,
estas nuna vinberar':
jen la destino !



Tristas arbaro;
jam branĉojn dehakitajn
forportas ĉaro.



Bovoj post jungo
trenadas plugilon, kaj...
aperas sulko.

Morto-sonorad'.
plugisto preĝas al Di'
ankaŭ ĉe kampar'.

